

“Pol-ur-as la bot-kaj ŝu-ojn” Alicio ripetis tre malrapide, dispecigante la vortojn en la celo eligi la nepre kaŝitan signifon.

“Per kio oni poluras viajn ŝuojn?” demandis la Grifo.

Alicio rigardis sur ilin kaj iom konsideris antaŭ ol respondi:

“Mi kredas ke oni traktas ilin per ciro aŭ iu alia nigrigilo.”

“Tie ĉi, sub la maro” diris la Grifo per tre profunda voĉo “oni poluras botojn per *blankigilo*. Do, vi nun komprenas.”)

“Kaj el kio oni fabrikas viajn piedirilojn?” Alicio demandis scivole.

“Ho, pri la piediriloj” respondis la Grifo “unue mi konsilas al vi ne uzi tiajn longajn kombinaĵojn, kiujn nur la plej lertaj maranoj povas uzi sen la danĝero esti malkomprenataj. Due, por respondi la demandon, jen la iloj kiujn ni uzas por igi la submaranojn *pie diri* la veron —ni metas sub la piedoj algojn, efektive ĉion *verd-an*, ĉar, bedaŭrinde, ne ĉiuj niaj gejunuloj estas instinkte *verd-iremaj*.”

“Se mi estus la merlango” diris Alicio ankoraŭ pripensante la kanton, mi dirus al la fokeno: “Malantaŭen Sinjoro! oni ne bezonas *vin*.”

“La Merlangoj ja ĉiam volas kunhavi fokanon” diris la Falsa Kelonio “kaj sen fokeno

neniu prudenta merlango volus vojaĝi ien en la maro.”

“Ĉu vere ne?” Alicio demandis tre mirigite.

“Kompreneble ne” respondis la Falsa Kelonio, “ĉar dum la vojaĝo li eble bezonos reklami siajn komercaĵojn en la vizitataj havenoj, kaj kunhavante fokanon li povos respondi senĝene al la demando: ‘Ĉu vi havas afiŝon?’ nur montrante al ĝi kaj dirante ‘Jen, sidante sur la pakajoj, *jena fiŝo!*’”

Ĉar Alicio ne tuj komprenis lian klarigon pri la fiŝa afiŝo, la Falsa Kelonio ofendiĝis kaj la Grifo profitis la silenton por proponi ke nun Alicio rakontu al ili *sian* historion.

“Mi nur povus rakonti miajn aventurojn komencante per la hodiaŭa mateno” diris Alicio naive, “ĉar ne utilis preparoli la antaŭajn tagojn, eĉ la hieraŭan, pro tio ke mi ne estis la sama persono.”

“Ĉion tion vi devas klarigi” diris la Falsa Kelonio.

“Ne, ne! la aventurojn antaŭ ĉio alia” diris malpacience la Grifo, “per klarigoj oni ja terure perdas la tempon.”

Sekve, Alicio komencis rakonti al ili siajn aventurojn de la tempo kiam ŝi ekvidis la Blankan Kuniklon. En la komenco ŝi sentis sin tre timema, pro la fakto ke ambaŭ bestoj tre